Arĝenta Filiko

ISSN 1176-418X

6-monata Bulteno de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

Revuo por membroj de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio **Oktobro de 2012**

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, PO Box 8140, Auckland 1150
Telefono: 0800 350 781
Retadreso: info@esperanto.org.nz

Venonta kongreso en Aŭklando

Aliĝu al la kongreso nun – plenumu kaj sendu la ĉi-kunan aliĝilon

Sign up to the congress now – complete and send in the attached registration form

Hillsborough estas antaŭurbo kiu kuŝas apud Manukau Harbour norde de la flughaveno kiu situas en Mangere. Tiu flughaveno estas la plej granda el la flughavenoj en nia lando. Kvankam multaj vizitantoj el eksterlando elektas viziti la famajn turistajn allogaĵojn de Nov-Zelando, do celas al Rotorua (terma regiono), la Suda Insulo kaj Velingtono, tamen Aŭklando mem ege meritas restadon.

St Francis Retreat Centre , 50 Hillsborough Road, troviĝas en pitoreska loko proksimume 20 minutojn for de la flughaveno kaj la saman tempon oni bezonos en trafiko por pluveturi al la urbcentro kaj la ĉefa ŝip-haveno. Interalie Aŭklando estas konata pro sia vulkana origino .... jen kaj jen estas konusoj, montetoj kun krateroj, la restaĵoj de erupcioj okazintaj de tempo al tempo dum la jarmiloj. Ekzemploj estas One Tree Hill, Mt Eden, kaj Mt Roskill, kiuj ĉiuj proksimas al Hillsborough. La plej juna estas la insulo Rangitoto. Ĝi ŝokis al la maorioj loĝantaj en la regiono kiam antaŭ ĉirkaŭ 700 jaroj pro erupcio de la mara profundo ĝi burĝonis kaj majeste ekokupis lokon en la golfo Hauraki. Nuntempe 1,5 milionoj da homoj faras sian hejmon en ĉi tiu belega moderna kaj progresema urbo.

Ni antaŭvidas ke en relative trankvila kongresejo (vidu stfrancisretreatcentre.org.nz) ni havos bonan okazon por plu lerni kaj uzi Esperanton. En someraj sunbrilaj kaj varmaj tagoj tie, danke al la ĝardenoj kaj arboj kiuj ĉirkauas la brikan konstruaĵon, ni ĝuos agrablan ‘etoson’ en ĉiu senco de tiu ŝatata Esperanta vorto. Havante antaŭan sperton mi pretas aserti ke la prizorgantoj (la stabo de St Francis) provizos al ni komfortan homecan medion por niaj aktivadoj. Kelkaj ekskursoj al lokaj allogaĵoj kaj vidindaĵoj estos aranĝataj.

Neniu timu ke eksmonaĥejo St Francis iel estas stranga domego, tre pia, silenta kaj taŭga nur por ermitoj, ĉar jam almenaŭ tri foje NZEA kongresis tie. En 2008 la Oceania Kongreso de Esperanto plenigis la kongresejon (40 enloĝantoj) kaj aldonaj kongresanoj tranoktis en lokaj moteloj. Kompreneble ni bonvenigos tiujn kiuj venos por iuj tagoj kaj sesioj, se ne por la tuta evento.

Nia gastinstruisto Grazina Opulskiene (de Litovio) povos helpi al la ne tiom spertaj lernantoj ĉar ŝi havas tre bonan talenton por gvidi kaj paroligi komencantojn kaj progresantojn. Sesioj en la matenoj speciale utilos por tiuj kiuj ĝis nun ne havis multe da okazo por paroli (ekparoli). Grazina estas tia aktiva entuziasma instruistino kiu havas vastan sperton en diversaj landoj kaj profunde scias Esperanton. Ŝi partoprenis la ĉi-jaran konferencon de ILEI (instruistoj) en Kunming en Ĉinio. Pri ĝi mi aŭdis tre pozitivajn kaj bonajn raportojn. La veteranoj kaj la flueparolantoj kaj spertaj altniveluloj povos aranĝi paroladojn, prelegojn, distrajn erojn ktp inter si kaj ankaŭ helpi al la komencantoj.

Se vi havas specialan peton pri manĝaĵoj aŭ pri pago bonvole ne hezitu kontakti al David Ryan (nia kasisto). La estraro de NZEA povos, depende de cirkonstancoj, helpi junulojn por kiuj la kostoj prezentas malfacilaĵon. La Fonduso Frank Swift de NZEA ekzistas ĝuste por tiu kialo.

La loka kongresa komitato (Aŭklanda Esperanto-Societo) bonvenigas proponojn por programeroj. Kontaktu al mi mem aŭ eĉ pli bone al estraro@nzea.org.nz. Alia rimedo uzeblas por interkomunikadi koncerne al la kongreso. Tiu rimedo, kiun mi rekomendas, estas meetup.com/Esperanto-NZ.

Bradley McDonald
Prezidanto

Summary in English

Our next congress will be held in Auckland on 10-16 January. The congress starts at 10am on 10 January and will finish at 3pm on 16 January. Please complete and send in the attached registration form by the end of December.

If you're from outside Auckland, you can choose to stay on site at the congress venue (the food is superb!) or make your own accommodation arrangements. You can also stay for the whole event, or just for a few days. Don't worry if you're just a beginner in Esperanto. Grazina Opulskiene, an experienced teacher from Lithuania, will give classes for beginners. It will be lots of fun!

Jarkunsido/Annual General Meeting

La venonta jarkunsido de NZEA okazos ĉe St Francis Retreat Centre, 50 Hillsborough Road, Mt Roskill, Aŭklando, je la 10.30 atm, la 13-an de januaro 2013.

The next annual general meeting of NZEA will take place at St Francis Retreat Centre, 50 Hillsborough Road, Mt Roskill, Auckland, at 10.30am on 13 January 2013.

Membrokotizoj por 2012/13 nun pagendas. Bv. plenumi kaj sendi la ĉi-kunan membroaliĝilon.

Membership fees for 2012/13 are now due. Please complete and send in the attached membership renewal form.

Adiaŭ al la ruĝa zono

Erin McGifford, Christchurch

En marto 2012 post multaj monatoj da atendado, duono de mia bela river-borda kvartalo en orienta Christchurch estis oficiale deklarita en la “ruĝa zono”. La grundo estis tre difektigita per la multaj lastatempaj tertremoj. Riparo de la grundo kaj la konstruo de profundaj fondaĵoj por la domoj bezonus tro da tempo kaj mono. Anstataŭe, ĉiuj konstruaĵoj kaj ĝardenoj, kaj akvo-pipoj ktp estos forigitaj. Mia propra domo kaj terpeco ne estis tre difektitaj, sed ne estas taŭge lasi nur kelkajn domojn en la loka zono.

Dum jaroj mi pagis altan asekuran kotizon por tuta rekonstruo se okazos tuta perdo. Nun, spite ke mia domo estas detruota kaj mi devas foriri kaj loĝi ie alie, la asekura kompanio ne pagos tutan rekonstruon, ĉar ili diras ke la problemo rilatas al la suba tero, ne la domo. Asekuraj kompanioj estas lertaj rilate malpliigon de siaj kostoj! Feliĉe, la registaro propnois pagi al domposedantoj en la ruĝa zono laŭ la 2007a valoro de iliaj hejmoj. Mi akceptis tion.

Mi sciis ke miloj da aliaj ruĝzonuloj konkursos kun mi por aĉeti novajn domojn. Mi rigardis interretajn reklamojn pri vendataj domoj. Feliĉe mi rapide trovis domon kiu plaĉis al mi. Translokiĝo bezonis multan laboron ĉar mi amasigis multajn librojn kaj aliajn posedaĵojn dum multaj jaroj. Mi estis tre malfeliĉa forlasi mian belan kvartalon kun ĝiaj multaj altaj arboj kaj centra parko. Ĝi estis proksima al la ŭrbcentro, sed trankvila.

Mia malnova domo estis konstruita en la 1870a jardeko. Mi loĝis en ĝi dum 33 jaroj. Mi estis en ĝi kiam okazis la tertremoj de septembro 2010 kaj februaro 2011. La domo skuiĝis kaj ŝanceliĝis, sed protektis min. Nun, tiu domo kiu dum 140 jaroj ŝirmis

siajn enloĝantojn staras malplena kaj sendefenda, atendante detruon. Tio kaŭzas al mi grandan malĝojon.

Mia nova domo troviĝas en pli ordinara kvartalo. El ĉiu fenestro mi vidas ne arbojn sed najbarajn domojn. Estas pli da trafika bruo kaj ne estas proksima parko aŭ rivero. Tamen, aŭtobusoj nun preterpasas mian domon, mi estas pli proksima al butikaro, kaj bona amikino loĝas tre proksime. Mi ankaŭ loĝas nun pli proksime al la Havenaj Montetoj, kaj mi povas suprenrigardi kaj ĝui la ŝanĝantan lumon sur iliaj altaj pintoj kaj valoj.

Mi aranĝis ke ĝardenistoj transplantu proksimume 35 plantojn el mia malnova ĝardeno al mia nova hejmo. Preskaŭ ĉiuj travivis. Mi estis speciale feliĉa kiam, post semajnoj da atendado, etaj novaj folioj aperis sur mia malnova pomarbo. Iom da la beleco de mia antaŭa hejmo travivos!

La nova domo de Erin en Christchurch

Feliĉa novaĵo

Gareth kaj Ĵanjo Cranefield fiere anoncas la naskiĝon de sia unua filo, Morgan Alexander Cranefield, la 12-an de septembro. Morgan iĝos Esperantisto de kvina generacio en la familio de Ĵanjo.

Multajn dankojn!

Vicky Crickett, Tauranga

Stanley Wells, Preston Sykes, Matthew Owen, Connor Cambourn, kaj Kate Millar de la Lernejo Montessori @ Bellevue, Tauranga

Kiel multaj el vi eble jam scias, mi instruas Esperanton (kiel volontulo) al infanoj en la Lernejo Montessori @ Bellevue en Tauranga dum unu horo du fojojn semajne. Ni ĵus finis la duan trimestron kaj miaj studantoj volas daŭre studi dum la venonta trimestro. Mi ĝojas ke ili tiom ĝuas la lingvon! NZEA kaj la Aŭklanda Esperanto-Societo tre afable donacis al ili la tre utilajn *Poŝamiko*-librojn kaj vortaron. La studantoj estis tre ekscititaj pro tio kaj tuj volas danki al la asocioj. Ili skribis sian unuan leteron en Esperanto – jen du ekzemploj:



Lokaj kluboj

Jen kontaktdetaloj de niaj kluboj tra la lando

Christchurch: Grupo kunvenas ĉiumonate en Christchurch. Kontaktu Erin McGifford ĉe erinmcgifford@iconz.co.nz aŭ (03) 337 3428.

Wellington: La Rondo de Wellington kunvenas inter februaro kaj decembro, la duan merkredon de ĉiu monato en la domo de Mary Richardson en Upper Hutt aŭ de David Ryan en Crofton Downs. Kontaktu David ĉe ryangomez@xtra.co.nz aŭ 04 479 4911.

Masterton: La klubo kunvenas je la 2-a ptm ĉiun merkredon inter februaro kaj decembro en la domo de klubano. Kontaktu Marilyn Henderson (06 377 0499 hejme).

Bay of Plenty: Grupo de Esperantistoj kunvenas regule en ĉi tiu regiono. Kontaktu Vicky Crickett (vcrickett@gmail.com).

Auckland: La Aŭklanda Esperanto-Societo regule kunvenas ĉe Ivan Zabonne, Great North Rd, Glendene. Por pliaj detaloj, bonvolu kontakti Howard ĉe 09 626 6129 aŭ Bradley McDonald ĉe 09 579 4767, aŭ retpoŝte ĉe hgravatt@ihug.co.nz aŭ bradley.m@vodafone.co.nz.

NZEA havas paĝon ĉe www.meetup.com/Esperanto-NZ/events. Tie vi trovos detalojn pri niaj kunvenoj en Nov-Zelando, kaj ankaŭ pri kunvenoj de Esperantistoj en aliaj landoj. Aliĝo al la retpaĝo estas senpaga.

FREŜA NOVAĴO!

La Universala Kongreso de Esperanto en 2014 okazos en Bonaero (Buenos Aires) en Argentino. Jen foto de registara konstruaĵo en la urbcentro.